

58

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1976



Nia kongresurbo Skellefteå salutas kaj invitas



Meze en la urbo

Skellefteå kun 72000 enloĝantoj estas areale la dugranda urbo de la mondo.

En Junio sub meznokta suno

Unu monaton pli poste ol kutime, nome inter la 12a kaj 18a de Junio 1976, renkontiĝos denove kelkcentoj da esperantistaj fervojistoj kaj iliaj familianoj okaze de la 28a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). La gastigonta loko situas en norda Svedio kaj nomiĝas Skellefteå.

Tiuj gekolegoj, kiuj partoprenis en 1956 la 8an IFEF-kongreson en Stockholm, rememoras kun emocio kaj ĝojo pri la bone sukcesintaj aranĝoj tie. Al ili kaj al la multnombraj aliaj IFEF-anoj ofertas sin bonvena okazo esti denove dum unu semajno en tiu norda lando kun ĝiaj specifaj belaĵoj. Longaj kaj helaj tagoj plibeligos la restadon.

Ĝis antaŭ du jaroj la nomo de la kongresloko estis apenaŭ konata al la plej multaj. Nun ni ekscias, ke Skellefteå situas 850 km norde de la metropolo Stockholm. La distanco egalas proksimume al tiu inter München kaj Hamburg. La proksima maro apartenas al la Botnia Sino, la koncerna urboparto nomiĝas Skelleftehamn.

Skellefteå en sia nuntempa, moderna aspekto ne montras unuavide, ke tiu regiono estis loĝigita jam antaŭ 6000 jaroj, kiam homoj de la ŝtonepoka periodo nutris sin per fiŝkaptado, simpla agrikulturo kaj produktado de ŝtonaj laboriloj. En la 13a jarcento kreiĝis la urba aspekto kaj kreskis la komerca centro, sed nur en la jaro 1845 la loko ricevis urbajn rajtojn per reĝa dekreto. Ke reĝoj ankoraŭ reprezentas Svedion, dum pri la politiko decidas socialdemokrata registaro kaj parlamento kun la nomo „Reichstag“, estu flanke menciata. La agrikulturo en la ĉirkaŭa regiono ludis gravan rolon ĝis 1920, kiam oni trovis mineralojn, eĉ oron, en la proksimaj montoj. Minejoj kaj fandfornoj formis la bazon por la nuntempaj industrioj. Precipe erco estas prilaborataj sed oni produktas ankaŭ kupron, arĝenton, plumbon kaj ĥemiajn varojn, kiuj duone estas eksportataj. Pluraj elektrejoj estas lokitaj ĉe la rivero Skellefteålo, kiu trafluas la komunumon; ili produktas elektran energion ankaŭ por aliaj regionoj.

Ne mirinde ke Skellefteå disponas pri ĉiuj antaŭkondiĉoj, por tie bone vivi, eĉ por akcepti nin kongresanojn el multaj landoj. Kiel kongresejo servos la tute

modernaj Eddahaloj, kie okazos la plej multaj aranĝoj. La laborkunsidoj demonstras denove la fakan karakteron de la IFEF-kongreso. Ankaŭ ne mankos pritraktendaj organizaj problemoj. Do valoras viziti multnombre la publikajn kunsidojn por informi sin pere de kompetentuloj. Sed krom tiuj programeroj kun oficiala karaktero atendas la kongresanojn abunda kultura kaj turista programo. En la malnova kamparana urbo ĝojigos la tradicia folkloro vespero. Tri socialaj ekskursoj kaj vizitoj al industriaj entreprenoj ebligas detalan informadon pri la sociaj kaj ekonomiaj situatioj. La sportamikojn atendas aparta evento: futbalmaĉo inter sveda virina teamo kaj IFEF-anaro. Kulmino de la turista programo estos kredeble la tuttaga ekskurso al la montaro kun vizito al la Laponoj kaj revojaĝo sub meznokta suno.

Sendube la 28a kongreso de IFEF allogos multajn partoprenantojn el nia lando. Ne tiel baldaŭ ripetigos tiel favora okazo por viziti la grandiozan Svedion en la kadro de IFEF-kongreso. Kiu disponas pri kelkaj feriaj tagoj, tiu interompu la relative longan vojaĝtempon vizitonte la metropolojn Kopenhagen aŭ Stockholm aŭ uzonte pramsipon ekde Lübeck-Travemünde. Por la aliaj kongresanoj aperos en BULTENO kaj Internacia Fervojisto indikoj, kiamaniere oni vojaĝos plej komforte norden. Do ne hezitu kaj aliĝu eble plej baldaŭ al nia 28a IFEF-kongreso en Skellefteå, kie laboremaj LKK-anoj bonvenigos vin sub meznokta suno.

W. B.

Kio estas „meznokta suno“?

Jen klarigo el la libro „Noni kaj Mani“:

En la regionoj, kuŝantaj en la polusa cirklo, oni observas somere jenan fenomenon:

Tuj kiam la brila sundisko estas malsupreniĝinta okcidenten ĝis la horizonto, ĝi ne plu malleviĝas, sed

moviĝas antaŭen en norda direkto laŭlonge de la horizonto. Dum horoj oni povas fikse alrigardi la sunon per nekovrita okulo, neniu malagrabra radia brilo ĝin plu ĉirkaŭas. Estas kvazaŭ ĝi retiras sian tutan fortegan lumon en sian propran cirklon, kiu nun ŝajnas multe pli granda ol dumtage. Malrapide, majeste la suno antaŭeniras laŭlonge de la norda horizonto kaj atinginte la orienton, ĝi iom post iom rekomencas leviĝi. Ĉi tiun fenomenon oni nomas „la noktomeza suno“. Tamen oni ne povas observi ĝin ĉie same longtempe. En Hammerfest, la plej norda urbo de Eŭropo, ĝi daŭras pli longe; en pli suda regiono, ĝi daŭras pli mallonge. Ekster la polusa cirklo ĉi tiu fenomeno ne videbliĝas.

La celo de la tuttaga (aŭ pli ĝusta tutnokta) ekskurso dum la venonta IFEF-kongreso estas la lapona metropolo Jokkmokk, situanta norde de la „norda polusa cirkulo“. Venu kaj miru! Tie vi travivos la miraklon de la meznokta suno.
— roe —

Informationen

zum 28. Internationalen Eisenbahner- Esperanto-Kongreß vom 12. bis 18. 6. 1976 in **Skellefteå Nord-Schweden**

Vorläufiges Programm:

12. 6. Sonnabend Ankunft
Interkona vespero; Zwangloses Beisammensein, um sich kennenzulernen und Wiedersehen zu feiern.
13. 6. Sonntag Stadtrundfahrt per Bus.
Gemeinsamer Gottesdienst
Feierliche Eröffnung
des Kongresses
Folkloristischer Abend
14. 6. Montag Arbeitssitzung
Fachvortrag
Kongreß-Ball
15. 6. Dienstag Halbtagsausflug 1
Empfang beim Bürgermeister
16. 6. Mittwoch Arbeitssitzungen
Halbtagsausflug 2
Bunter Abend
17. 6. Donnerstag Vollversammlung
Sozial-Ausflug (Schulen usw.)
Fußballspiel, Internationale Esperanto-Elf gegen Damenmannschaft aus Skellefteå
18. 6. Freitag
Ausflug
Abfahrt 14.00 h, Rückkehr 2.00 h
Per Bus zur Lappland-Metropole

„Jokkmokk“. Unterwegs besuchen wir den großen Wasserfall „Stosforssen.“. Beim Überqueren des Polarkreises machen wir eine Pause, damit wir in Ruhe fotografieren können.

In Jokkmokk werden wir eine typisch lappländische Spezialität zum Abendbrot bekommen. Auf der Heimfahrt unter der Mitternachts-sonne besuchen wir das Städtchen Arvidsjaus, wo wir die Möglichkeit haben werden, den dort üblichen „Salzkaffee“ zu probieren.

19. 6. Sonnabend Heimfahrt

El la grupoj

Bremen:

La 18an de Novembro regis granda ĝojo en la kurso: 8 kursanoj tre bone sukcesis en la „Kursfina Ekzameno“. S-ro Brandenburg prezidis la ekzamenon kaj esprimis sian surprizon pri la bona rezulto. Ni studis laŭ la rekta metodo. Ni finis tiun feliĉan vesperon per gaja kanto.

En Bremen okazas ĉiumonate io!

Laŭ tiu devizo prelegis s-ro Eigendorf „Pri Turoj“. Li surprizis nin en tre interesa maniero pri kulturaj, historiaj kaj ankaŭ teknikaj faktoj de diversepokaj turoj. Komprenoble ne mankis la fama Babela Turo en lia prelego.

En Decembro okazis nia Zamenhof-festo, kiel kutime en gaja, rum-tea rondo kun verdaĵo kaj kandeloj sur la tablo.

En Januaro 1976 ni vizitis la faman hejmlandmuzeon „Fokke Muzeo“.

S-roj Hartig kaj Schlepper preparis interesan matinean programon.

<Informoj: tel 833 / 1290, kol. Deß, Bw Bremen Rbf.>

Hartig

Esperanto-Gruppe Bremen

NOVA JARO — NOVA KOMENCO

Kio okazos en 1976??? — Vi jam scias: **Rigardu nian provizoran programon:**

Februaro: Jarĉefkunveno de la loka grupo.
Komenciĝas du novaj kursoj.

Marto: Prelego kaj diskuto pri trajnradiofonio kaj sekurec-instalaĵo ĉe lokomotivoj.

Ni invitu gastojn kaj specialistojn.

Aprilo: Keglaj vesperoj.

Majo: Printempa ekskurso al Worpsswede (Niedersachsenstein)

Junio: IFEF-kongreso en Skellefteå, Svedio. Feriaj aranĝoj.
Julio: Ĝardena kunveno por hejmmrestintoj.
Aŭgusto: Raporto pri IFEF-Kongreso en Svedio.
Septembro: Ekskurso: Vojo tra marĉejoj. (Teufelsmoor).
Oktobro: Aŭtuna ekskurso. Fervojistaj konveno en Paderborn.
Novembro: Lingvaj ekzamenoj.
Decembro: Zamenhoffesto.
Krome: Regulaj grupkunvenoj kun ĉiam interesaj programoj!

En Bremen okazas ĉiumonate io — speciale por VI

Tial: PARTOPRENU!

Fariĝu membro de la Bremena Grupo!
Informoj: H. Dieter Hartig, 28 Bremen 1, Kasseler Straße 76, tel. 35 98 16 Bw Bremen Hbf (59)

Essen/Dortmund:

Por la 15a de Decembro 1975 invitis Günter Bartz, distriktkomisiito de la BSW Essen, gekolegojn kaj familianojn el la fervojaj distriktoj Essen kaj Köln al la tradicia Zamenhof-festo kaj komuna renkotiĝo. Kune kun membroj de la loka Esperanto-grupo Dortmund ĉeestis ĉ. 60 personoj en la „Auslandsinstitut“. En bone preparita klub-salono, ornamita per kristnaskaj kaj Esperanto-simboloj, post la salutvortoj de s-roj Weichmann kaj Bartz, oni flegis personajn kontaktojn dum la kaftrinkado kun membakita kuko de s-ino Bartz. Kolego Barnickel montris du filmojn esperantlingvajn, unue pri la pasinta IFEF-kongreso Villach kaj due kristnaskajn impresojn. S-ro Renz montris lumbildojn pri la pasinta SAT-kongreso Nederlando kaj pri la „tago de malfermita pordo“ en la Auslandinstitut. La bone organizita kaj bone frekventita aranĝo daŭris ĝis 21.30 h kaj estis bona sukceso por la loka grupo kaj por la GEFA-distriktoj.

Frankfurt: La urba grupo, kies estraranoj parte estas fervojistoj, sukcesis post multjaraj klopodoj, ke la magistrato konsentis la nomigon de Esperanto- kaj Zamenhof-strato en nova kvartalo de Frankfurt. Tria strato nomiĝos laŭ s-ro Barthel, mortinta tre agema Esperantisto. 25 jaroj pasis en Novembro deponit la esperantistiĝo de kol. Barnickel. En la fervojista movado li plenumis diversajn funkciojn. Ekz. li gvidis kursojn, redaktis

BULTENO dum 6 jaroj, preparis dufoje la revizion de la IFEF-statuto, helpis en 1967 organizi la IFEF-kongreson en Fulda kaj oficas kiel lingva ekzamenkomisaro, estrarano de la urba grupo kaj kasrevizoro de ROMOLO. Kelkfoje li produktas filmon okaze de kongresoj.

Poŝtmarkekspozicio en Ulm

La 5a poŝtmarkekspozicio de la fervojistoj en la Sociala Organizo de DB okazis je la 17. — 19. 10. 1975 en la Danuba-Halo en Ulm (5a BSW-Phila). Estis landa ekspozicio en la rango 2 laŭ la filatelaj reguloj. La ĉefa organizanto de la ekspozicio estis s-ro Herbert Rötter, ĉefstacidomo Ulm, en kunlaboro kun la sociala organizo de DB.

Estis prezentitaj pli ol 100 kolektaĵoj de germanaj fervojistoj, inter ili multaj landaj kaj diversaj laŭ motivaj kolektaĵoj. Ankaŭ fervojistoj el Aŭstrio, Svisujo, Nederlando, Italio kaj Luksemburgio montris specialajn kolektaĵojn kun fervojaj motivoj. Gojige estas, ke inter la ekspoziciita materialo ankaŭ estis 3 kolektaĵoj kun la temo ESPERANTO. Estis en la honora klaso la kolektaĵo de s-ano Mager, BSG Frankfurt kaj en la konkursa klaso la kolektaĵo de s-ano Barmaneter, BSG Aŭgsburg kaj s-ano Heimlich, BSG Hannover.

Je la 18. 10. 1975 vespere estis granda festvespero kun danco kaj disdono de la premioj. Inter la ĉeestantoj ankaŭ estis eksterlandaj gastoj. Granda ĝojo estas, ke ĉiuj 3 ESPERANTO-kolektaĵoj ricevis medalojn, nome kolekto de s-ano Mager, oran, de s-ano Barmaneter, arĝentan, kaj s-ano Heimlich, bronzan.

Eble tia bona rezulto instigos plurajn ESPERANTO-poŝtmark-kolektantojn ankaŭ iam montri iliajn kolektaĵojn en venontaj ekspozicioj.

Das Wichtigste dieser Ausgabe in Deutsch

Seite 2: Im Juni unter der Mitternachts-sonne.

Seiten 3+4: Berichte aus den Gruppen und von der Briefmarkenausstellung in Ulm

Seite 7: Sprachecke Nr. 4

Seite 8: Nachrufe Pagelsdorf, Winkelhaus und Simon

Seite 9: Veranstaltungen in NRW und der Schweiz

Mitteilungen des Vorstandes

Die Mitglieder des Arbeitsausschusses Esperanto trafen sich am 13. 12. 1975 in Lipstadt. Die Jahresversammlung Treuchtlingen wurde mit Blickrichtung auf die diesjährige Veranstaltung besprochen. Zur 20. Jahresversammlung vom 8. – 10. Oktober 1976 hat der Bezirk Essen nach Paderborn eingeladen. Die Seniorentreffen 1975 haben allseits Anklang gefunden (s. Bulteno 5/75, Seiten 8/9). Falls entsprechende Mittel auch 1976 zur Verfügung stehen, sollen Treffen in Wuppertal für den nördlichen, und in Karlsruhe für den südlichen Bereich vorbereitet werden. Zu gegebener Zeit wird hierzu noch besonders eingeladen. Um die Reise zum IFEF-Kongreß angenehm und erlebnisreich zu gestalten, werden die vom Kollegen Ritterspach ausgearbeiteten Reisevorschläge in IF 1/76 veröffentlicht. Ebenfalls hat der dänische Landesverband für seine Mitglieder einen Reisevorschlag ausgearbeitet.

Die nächste Besprechung des GEFA-Vorstandes mit den Bezirksbeauftragten soll am 20. 3. 1976 in Frankfurt/Main stattfinden. Das Anschriftenverzeichnis der GEFA-Mitarbeiter finden Sie auf der letzten Seite dieser Ausgabe mit zahlreichen Änderungen nach dem Stande vom 1. 1. 1976.

Wer macht gern so etwas?

Noch ist es nicht lange her, daß unser Mitglied Kurt Jentsch gestorben ist. Über Jahre hindurch hatte er es sich zur Aufgabe gemacht, für GEFA eine wirkungsvolle Ausstellung zu fertigen. Er sammelte unermüdlich Material, dachte sich praktische Lösungen für die Darstellung aus und setzte seine Gedanken in die Tat um. Das Ergebnis haben unsere Mitglieder und Tausende anderer Personen in Form der fertigen Wanderausstellung besichtigen können. Es war „seine“ Ausstellung, und er hat sie auch bisweilen zu den Orten begleitet, wo sie gezeigt werden sollte, und sie dort unter seine Obhut genommen. Nach Jentschs Tode wurde die Ausstellung letztmals in Treuchtlingen gezeigt. Zwar ist augenblicklich sichergestellt, wo sie aufbewahrt werden kann, aber leider haben wir noch keinen Betreuer gefunden. Es ist jedoch notwendig, daß sich

jemand bereit erklärt, sozusagen die Geschäftsführung für die Ausstellung zu übernehmen. Dies ist vor allem deshalb notwendig, damit das liebevoll zusammengestellte Material, das in 2 Behältern untergebracht ist, gut erhalten bleibt und auch von Zeit zu Zeit auf den neuesten Stand gebracht wird.

Einer unter uns, der gerne so etwas macht, wird also dringend gesucht. Kosten werden ihm nicht entstehen. Er müßte nur ein bißchen Lust und Liebe zur Sache mitbringen. Bitte Meldung an den GEFA-Sekretär, BAmM Schrappe, SV (BVA) Nord, 4400 Münster (Westf.), Ruf 945/1771.

Mi pardonpetas la jenajn preserarojn en Bulteno 5/75:

paĝo 2, dekstra flanko en la 10a linio „organizaj“

paĝo 3, maldekstre, la lastan linion en la unua alineo „membrec“; dekstra flanko, dua alineo, sepa linio „pri la 27a IFEF-kongreso, filmitajn kun ...“

La lastsepan linion de la artikolo „ilustritaj“.

Paĝo 4, daŭrigo de la artikolo „Ekzameno pri lingva kapableco en Treuchtlingen“, dekstra flanko, 6a linio „minon“ kaj la dulastan linion „ekzemple“.

Paĝo 5, maldekstre „Kontaktoj, aranĝoj“, dua alineo, 13a linio „esti“, 17a linio „pro“.

Paĝo 7: sub la bildo en la artikolo „Novaĵoj el la estraro“ en la dua linio maldekstre „Treuchtlingen“,

Paĝo 9: „El la grupoj“, la trilastan linion dekstre „Ĝardeno – mia hobbio, kiu stimulis al“.

Pri la transporta servo de la Popola Respubliko Ĉinio

La fervojo de Ĉinio estas nun kiel antaŭe la plej grava transportentrepreno. De 1949 ĝis 1971 oni povis pligrandigi la fervojan reton (nombron de la trak-kilometroj) de 20 000 al ĉ. 42 000 km. La kvanto de la varoj altiĝis de 100 milionoj da tunoj (1950) al 560 milionoj da tunoj (1970). La surstrata vartrafiko transportas nur proksimume dekonon de ĉi tiu kvanto. La limigita nombro de finkonstruitaj stratoj montriĝis ĉefa obstaklo por pligrandigi la stratrafikon. (El „DB-Kurzauszüge“ kajero 7/1975, tradukis F. Busse)

S-ro Pickel, Nürnberg, raportas:

Ĉefurbestro por Esperanto

Weißenburg: — Sabaton, la 6an de Decembro, okazis en la nordbavara urbo Weißenburg informkunveno pri Esperanto. La iniciato fakte eliris de la ĉefurbestro de tiu urbo, d-ro Zwanzig, kiu komence de Oktobro okaze de la jarkunveno de GEFA en Treuchtlingen informis la publikon pere de la loka gazeto, ke esperantistoj de la angla urbo Chichester serĉas kontaktojn kun esperantistoj el Weißenburg. Bedaŭrinde en tiu urbo ne estas esperantistoj. Kio do estas farenda? Kelkaj germanaj aktivaj esperantistoj konkludis, ke oni do devas krei esperantistojn en tiu urbo.

Estis Joachim Gießner, prezidanto de GEFA, Herzberg, kaj Josef Weidacher, distrikta delegito de GEFA, München, kiuj turnis sin al la urba administracio kun la propono okazigi informkunvenon por la enloĝantoj de Weißenburg. Kun subteno de loka fervojisto, Helmut Osteried, tiu intenco realiĝis.

Krom dudeko da interesuloj la kunvenon ĉeestis la ĉefurbestro de Weißenburg, d-ro Zwanzig, la urba kulturreferento Wolfgang Schöffthaler, magistratano por kulturaj aferoj, Schmidt, kaj redaktoro de la loka gazeto „Weißburger Tagblatt“, kiu jam antaŭe informis pri la kunveno. S-ino Elfriede Kruse, Frankfurt/M, sekretariino de IFEF, montris interesajn lumbildojn pri sia Esperanto-vojaĝo al Japanio kaj per tio donis konvinkigajn ekzemplojn pri la praktika uzo de Esperanto.

Joachim Gießner, GEFA- kaj IFEF-prezidanto, parolis pri la ekesto kaj disvastiĝo de Esperanto. Per mallonga provleciono li sukcesis instigi la interesulojn paroli siajn unuajn Esperanto-frazojn. La ĉefurbestro en mallonga salutparolado deklaris, ke li subtenas la celojn de la Esperanto-movado kaj ke li tre ĝojus, se en Weißenburg troviĝus homoj, kiuj volas lerni Esperanton. Li eĉ promesis, si tio estas necesa, ankaŭ finance subteni Esperanto-kurson. La Esperanto-gastojn el Frankfurt, Herzberg, Lichtenfels, München kaj Nürnberg en la ĉefurbestro invitis enskribi en la gastlibro de la urbo.

Estis interkonsentite kun la urba kulturreferento anonci por komenco de Februaro 1976 Esperantokurson, kiun gvidos Ludwig Pickel, Nürnberg.

Oberbürgermeister für Esperanto

Weißenburg: Am Samstag, dem 6. Dezember 1975, fand in Weißenburg/Bay. mit Unterstützung der Stadt Weißenburg ein Informationsnachmittag über die internationale Sprache statt. Die Initiative ging eigentlich von Oberbürgermeister Dr. Zwanzig aus, der Anfang Oktober über die Lokalpresse die Öffentlichkeit informierte, daß Esperantisten der englischen Stadt Chichester Kontakte mit Esperantofreunden in Weißenburg suchten. Diese Mitteilung ließ einige Esperantisten nicht ruhen, und so gab es am Samstag für Weißburger Gelegenheit, sich über Esperanto zu informieren.

Neben einer Anzahl von Interessenten waren auch Oberbürgermeister Dr. Zwanzig, der Kulturpfleger Stadtrat Schmidt und Städtischer Kulturreferent, 1. Vorsitzender des Volksbildungswerkes Wolfgang Schöffthaler, sowie Helmut Osteried vom Bahnhof Weißenburg, erschienen.

Frau Elfriede Kruse, Frankfurt, Sekretärin des Verbandes internationaler Eisenbahner-Esperantisten, zeigte interessante Lichtbilder über eine Esperanto-Reise durch Japan und gab so überzeugende Beispiele für praktische Anwendung des Esperanto. Joachim Gießner, Herzberg, der Vorsitzende der Eisenbahner-Esperantisten, sprach über die Entstehung und Verbreitung der Internationalen Sprache. In einer kurzen Sprachdemonstration regte er die Teilnehmer an, ihre ersten Esperanto-Sätze zu sprechen.

In einem Grußwort erklärte Oberbürgermeister Dr. Zwanzig, daß er die Esperanto-Bestrebungen unterstütze und daß er es begrüßen würde, wenn in Weißenburg bald ein Esperantokurs im Rahmen des Volksbildungswerkes stattfinden könnte. Die Esperanto-Gäste aus Frankfurt, Herzberg, München, Lichtenfels und Nürnberg bat er, sich ins Gästebuch der Stadt einzutragen. Bei der Veranstaltung war auch das „Weißburger Tagblatt“ vertreten.

Mit Wolfgang Schöffthaler, dem Städtischen Kulturreferenten, wurde vereinbart, für Februar 1976 einen Esperantokurs anzubieten.

Ĉi-loke necesas danki al s-ino Kruse kaj al s-ro Gießner, ke ili faris longan vojaĝon por sukcesigi tiun kunvenon, kio ankaŭ montris ke la germanaj Esperanto-fervojistoj, speciale ilia gvidantaro, apartenas al la rondo de la plej aktivaj esperantistoj en FRG.

Festeto en Nürnberg

La esperantistoj de Nürnberg kune kun fervojistaj gastoj kaj kun kelkaj anoj de nuntempa Esperantokurso festis en modesta kadro la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof, merkredon la 10. 12. 1975. Regis vigla agrabla atmosfero!

Lingva angulo N-ro 4

El la Regularo Esperanta

Jen la kvina el la **16 REGULOJ!**

⑤ „Pronomoj personaj“: mi, vi, li, ŝi, ĝi. (pri objekto aŭ besto), si, ni, vi, ili, oni; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finaĵo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

SIA — oder nicht???

Das von „si“ abgeleitete „sia“ heißt „sein“ oder „ihr“ im Sinne von: sein eigener.

„Sia“ ist nur anzuwenden, wenn es sich auf einen Satzgegenstand in der **3. Person** (Ein- und Mehrzahl) zurückbezieht:

- | | |
|--------------------------|------------|
| Li ŝatas sian hundon. | — propran |
| Li ŝatas lian hundon. | — de amiko |
| Ili laŭdas sian patron. | — propran |
| Ili laŭdas ilian patron. | — de amiko |

Da „sia“ rückbezüglichen Charakter hat, kann es **nicht** im Satzgegenstand selbst stehen:

Ili aŭ iliaj amikoj venos. (ili=1. Sg; iliaj amikoj=2. Sg.)

Li estas pli sperta ol lia filo. (li=1. Sg.; lia filo=2. Sg.)

Si kaj ŝia fratino foriras.

Aber:

Si kun sia fratino foriras.

In verkürzten Nebensätzen, (in denen der Satzgegenstand fehlt) steht „sia“, wenn sich „sein“ oder „ihr“ auf den **gedachten Satzgegenstand** bezieht:

La kuracisto petis la malsanulon, montri al li sian vunditan brakon.

Aber:

La kuracisto petis la malsanulon, iri en lian atendejon.

Übungen zu „Sia — oder nicht???“ siehe Lingva Angulo n-ro 5.

Hartig

Ĉe lago de l' Alpo

Jen vidu la smeraldon! Inter altaj montoj situas ĝi, kelkfoje sen ondmovo. Je ĉiu tempo ĝi naskiĝas el mil fontoj denove per etern-efika povo.

Arbaroj, kampoj, lokoj estas ĝiaj limoj; ĝi estas kvazaŭ glas' da klara vino. Impulsaj fortoj fluas al la malproksimoj el tia lago ĝis la tera fino.

La horizonto reflektiĝas en la lago, en ĝi silente banas sin la suno; jen perfektiga sinfoni' je bela tago, kaj nokte, se ekbrilas plena luno.

Sed ve, se ŝtormaj ventoj furioze blovas, kaj ondoj brue ŝaŭmas pro petolo, eksonas mortkantado, kiu laŭte provas timigi nin per potencega volo.

Restadu iom sur najbaraj altaj montoj, rigardu la miraklon de l' naturo! Aspekto ĝia estas kvazaŭ kiel ondoj de la anim'. — Do — ĝuu ilin kun plezuro!
A. Benders

Eŭropa Ferio-Semajno

(EFS / E-Fo-So)

Kampado-amanto en iu urbeto emfaze proponis fervore:

„Vi devas fariĝi natura esketo — dormante en tendo favore;

kaj krome migradu dum pluva vetero — eĉ se vin turmentas kataro. Moderna ja estas ĉi tiu afero sen lito en iu tendaro

dum noktoj malvarmaj, se pluvo eĉ falas, kaj oni kun ranoj komune sur herbo malseka en tendo rivalas, printempe, somere aŭtune.“

Ferio-amik' rekomendas la jenon:

„Kampadon vi ne plu bezonas; evitu nesanan, malsekan terenon; E-Fo-So pli bone imponas!

La tendo-kampado — asketa plezuro — ne taŭgas por ĉies bezono, kun ranoj sur herbo en raŭka naturo, anstataŭ sub seka plafono.

Kaj krome ebligas en E-Fo-So-rondo dezir' al kontakt' kun personoj, kun homoj venintaj el landoj de l' mondo dum belaj ferio-sezonoj.

Jen ili komprenas sin per Esperanto, per lingvo havanta signifon. Ĝi donas al ili per vorto kaj kanto — rezulton de l' ĝojo — edifon.“

A. Benders

Nekrologojn

La 1an de Oktobro 1975 mortis tute neatendite nia membro

Wilhelm Pagelsdorf

el Solingen. Li estis 75 jara. Jam en 1928 li esperantiĝis kaj estis membro de SAT, UEA kaj kvankam ne fervojisto ankaŭ membro de GEFA. Li gvidis kelkajn kursojn en la iama fervoja-distrikto Wuppertal kaj partoprenis multajn kongresojn en- kaj eksterlandajn. Ofte li estis gastulo de niaj jar-kunvenoj.

La entombiĝ-ceremonion partoprenis la GEFA-redaktoro kaj kondolencis nome de la GEFA-estraro kaj de la membroj el la distrikto Köln.

En aĝo de 72 jaroj forlasis nin en Novembro 1975 nia fidela kaj sincera membro en Saarbrücken-Riegelsberg

Otto H. Winkelhaus

emerita fervoja-suprakonsilisto, iama direktoro de fervoja riparejo Saarbrücken-Burbach, portanto de Merita Kruso. Ek de 1952 li regule okupis sin pri Esperanto.



Otto H. Winkelhaus †

Dum multaj jaroj, ĝis sia emeritiĝo 1968 li estis distriktkomisiito en Saarbrücken. Li gvidis Esperanto-kursojn kaj estis ĉiam preta labori

por la disvastigo de la Internacia Lingvo. Malgraŭ sia aĝo li legis multe kaj estis bone informita. Ankoraŭ pasintjare li partoprenis la renkontiĝon de emerituloj en Würzburg. Poste li dankis letere al GEFA kun entuziasmo por tiu interesa kaj agrabla aranĝo.

Ni konservos pri li bonan memoron. Li ripozu en paco.

GEFA-estraro

Nur nun ni eksciis, ke la 11an de Novembro 1975 mortis nia emerita membro

Adolf Simon, 76 jarojn aĝa, Precipe en la komenca tempo de nia postmilita GEFA li estis tre aktiva. Kiel teknika kolego, dum jaroj li estis estro de la riparejo en Kaiserslautern, jam en la 4a IFEF-kongreso en Lindaŭ li zorgis pri interesaj fakaj ekskursoj kaj prelegoj. Sed eĉ pli grava estis lia rolo kiel redaktoro de „Bulteno“. La unuan numeron en Oktobro 1952 kaj daŭre ĝis 1954 ni ŝuldas al lia entreprenemo. Krome sub la tiamaj ne facilaj cirkonstancoj li aldone pretis transpreni la oficon de l'GEFA-prezidanto same ĝis 1954.

Sur internacia tereno li kunlaboris dum kelkaj jaroj en la tiama Terminara Komitato. Kaj certe multaj ĉeestintoj de la kongres-kunvenoj ankoraŭ memoras pri la metalaj tablo-insignoj en formo de naciaj flagoj, kiuj staris antaŭ la respektivaj landaj delegitoj. Ankaŭ ili estis lia verko. Li krome kompilis sur mini-papereto 30×11 cm granda la kompletan Esperanto-gramatikon inkl. prepoziciojn, vortprovizon kpt., tiel ke oni povis kunporti ĝin en faldita formo en la plej malgranda poŝo.

Certe ne plu eblas nuntempe menciigi ĉiujn meritojn de kolego Simon, kiu en tiuj jaroj estis unu el la elstaraj figuroj de nia postmilita fervojista movado. Li estis ĉie ŝatata pro sia agrabla, ĝentila personeco. Ni ne forgesu lin kaj ligu al tiu ĉi promeso nian sinceran dankon pro ĉio, kion li malavare faris por nia germana asocio kaj ankaŭ por IFEF.

Gießner

Anoncoj

La Esperantistoj de Wuppertal kaj Schwelm aranĝos en Niederbergisches Museum, 5603 Wülfrath, sabaton la 3an de Julio 1976, je la 15a h, specialan kaftrinkadon (t. n. „Bergische Kaffeetafel“) je prezo de 4,50 gm. La nombro de la partoprenontoj estas limigita (40). Pro tio interesuloj el la Ruhr-, Rhein- kaj Wupper-regionoj estas petataj kiel eble plej baldaŭ aliĝi sendante antaŭpagon de 2,00 gm poŝtmarke al Anton Kronshage, Eulenweg 5, 5830 Schwelm, kiu poste donos al la aliĝintoj pli detalajn informojn pri la muzeo ktp.

Zamenhof-Festo en Paderborn

130 personoj partoprenis la grandan Zamenhoffeston de la Eŭropa-Klubo la 20an de Decembro 1975 en Paderborn, FRG. La prezidanto de la Eŭropa-Klubo, Hermann Behrmann, povis saluti gastojn de proksime kaj malproksime; ĉiuj venis, por foje vidi, kio okazas en Paderborn rilate la planlingvan instruadon. La gastoj venis el Nederlando, Britio, Francio, Jugoslavio, sed ankaŭ el Paderborn kaj la apudaj urbetoj.

La urbo estis reprezentita pere de urba direktoro Dr. Bernward Löwenberg. Por la German-Angla Klubo parolis s-ino Agethen por UEA ties trezoristo, s-ro Woessink. La festparoladon faris profesoro d-ro Helmar Frank, li akcentis, ke la infanoj lernis lingvon, kiun hejme kutime neniu alia parolas. Tio konsiderinde levas ĉefe ĉe pli junaj infanoj la memkonscion. Li kuraĝigis la infanojn daŭrigi, ĉar la bazaj scioj poste multe helpas lerni pliajn lingvojn. Korespondamikojn oni facilege povas trovi. Li invitis kaj la multajn gepatrojn kaj la infanojn partopreni en la Someraj Universitataj Semajnoj, kiujn okazigos la Eŭropa Klubo de la 16a ĝis 30a de Julio 1976 en Primošten.

Partoprenis ankaŭ kolegoj el Essen, Minden kaj Münster/Vestfaliao. Distriktkomisito Bartz kiel reprezentanto de la distrikto Essen salutis la ĉeestantojn nome de GEFA kaj de la Esperanto-grupo Dortmund kaj stimulis partoprenon al la GEFA-jarkunveno en Oktobro 1976 en la sama urbo.

La 17a Eŭropa Feriosemajno en Svislando okazos de la 12a ĝis 18a de Sept. 1976 en Magliaso apud la lago de Lugano.

Moderna feriocentro – propra banejo
hejtebla – elstara kuirejo –
Esperanto-lecionoj diversgradaj –
gviddataj ekskursoj viaj – vesperaj
prezentadoj distraj.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstraße 17, CH-5200 BRUGG

Francio

Esperanto-edziĝfesto en Francio!

Niaj francaj geamikoj

Denise Hervouet kaj Hilaire Happi

edziĝis la 8an de Novembro 1975.

Al ili ni tutkore gratulas kaj deziras al ambaŭ longdaŭran harmonian kunvivadon.

GEFA-estraro

Unsere Veteranen

Am 2.12.1975 konnte die Eisenbahner-Esperantisten-Gruppe Nürnberg ihrem ältesten Mitglied zum 78. Geburtstag gratulieren. Es war der allen aktiven Eisenbahneresperantisten bestens bekannte **Reinhold Schmidt, 85 Nürnberg**, Johannisstraße 33/105.

Unser Mitglied Schmidt ist seit 1921 Esperantist. In Begleitung seiner Frau besuchte



er alle IFEF-Kongresse und GEFA-Jahresversammlungen, wenn ihn keine Krankheit daran hinderte. Auch unter den Naturfreunden hat er sich als Esperantist einen Namen gemacht. Er bringt in deren Mitteilungsblatt immer wieder Berichte in Esperanto. In vielen Ländern hat er Bekannte, mit denen er schon seit Jahren in engem Briefkontakt steht.

**Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanto Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: Januaro 1976**

Estraro

Prezidanto: BAR Gießner, Bf 3420 Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAMtm Graß, BD 5000 Köln - F-Büro, F 60 - Basa 943/1242 privata adreso: 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13

Sekretaro: BAMtm Schrapp, SV Nord, - Gruppe BVA - 4400 Münster (Westf.); Basa 945/1771

Apartaj komisiitoj

Administradon de la BSW-financrimedo: BHS'in Kruse, Sozialamt, 6000 Frankfurt/M; AA 517; Basa 955/3280
privata adreso: 6000 Frankfurt/Main 74, Wienerstraße 21

Arkivo: BOS Barmaneter, Bf 8940 Woringen (Schwaben) - über Memmingen - Bez. München; Basa 964/824/365

Biblioteko kaj gazetkolektado:

BAMtm Rösemann, BD 3000 Hannover, Bf 70, Basa 949/2378 aŭ 1350

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf 5830 Schwelm (Köln); Basa 946/848/126

Fakterminaroj: HLOkf Hartig, Bw 2800 Bremen Hbf; Basa 949/833/365

Junularaferoj: BS Heimlich, 3400 Northeim (Hannover); Basa 949/886/178

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:

BAMtm Lautenbach, BA 6400 Fulda; Basa 957/822/243

Kasisto: BS Bernhard, Bf 6703 Limburgerhof; Basa 953/856/42 aŭ 43

Verbado/Informado: TBAMtm Brandenburg, Hbm 4400 Münster (Westf.); Basa 945/397

Distriktkomisiitoj

Essen: BOS Bartz II, Bf 4600 Dortmund-Hörde; Basa 944/800/718/55 aŭ 800/809/14

Frankfurt/Main: BAMtm Kiefer, ZVL 6000 Frankfurt/Main, AA 5529; Basa 955/3764

Hamburg: BAR Lepke, BD 2000 Hamburg - B-Büro -; Basa 947/1581 aŭ 5569

Hannover: BHS Heimlich, Bm 3040 Soltau; Basa 949/850/127

Karlsruhe: BAR Hug, BD 7500 Karlsruhe - Ps-Büro Ps 26; Basa 953/5005

Köln: BOI Herlitze, BD 5000 Köln, Büro B (Ozl); Basa 943/473

München: Vorhdw Weidacher, Bw 8000 München-Ost; Basa 962/834/533 aŭ 566

Nürnberg: BHS Müller, Bahnpolizeiwache Hof, Bp-Posten 8620 Lichtenfels; Basa 966/842/388

Regensburg: TBAMtm Röder, BD 8400 Regensburg - T-Büro - Th 8; Basa 965/5858

Saarbrücken: BHS Müller, Bm 6620 Völklingen; Basa 956/891/134

Stuttgart: TBAR Krüger; BD 7000 Stuttgart, Bmkr 3; Basa 952/5725

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Ĉi tie ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estraranoj kaj de la distriktaj komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian sekretaron.

Eine Bitte an unsere Mitglieder

Wir wollen nicht wie die Katze um den heißen Brei streichen. Es geht um den Verbandsbeitrag, der schon lange Jahre nicht mehr erhöht wurde trotz immerwährender Inflation. Wir brauchen nicht zu erhöhen, weil wir stets in der Lage waren, mit dem vom BSW zur Verfügung gestellten Mitteln unsere Ausgaben zu decken. Wir konnten daher den Beitrag so bemessen, daß er in der Hauptsache reichte, um unsere an IFEF zu zahlenden Mitgliederbeiträge zu bestreiten. Infolge der bekannten Finanzsituation der DB sah sich nunmehr auch der Hauptvorstand des BSW zum zweiten Male innerhalb eines Jahres gezwungen, die Mittel für die Freizeitgruppen drastisch zu kürzen. Um unsere Arbeit überhaupt einigermaßen fortführen zu können, sahen wir uns daher genötigt, den Mitgliedsbeitrag für das Jahr 1976 auf 9,- DM festzusetzen. Wir glauben, daß für diese, gemessen an den allgemeinen Verhältnissen, äußerst bescheidene Summe jedes Mitglied Verständnis aufbringen wird. Wir bitten alle Bezirksbeauftragten, Gruppenleiter und Kassierer, die notwendigen Schritte zu unternehmen und auch Daueraufträge anzupassen. Leider konnten wir diese Änderung nicht früher bekanntgeben, weil wir erst Anfang Februar über die Mittelzuteilung für 1976 unterrichtet wurden.

GEFA

**Redakfino por n-ro 2/1976
estas la 25. 3. 1976**